REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 6 (85) decembro 2014*



en la numero

Viva metiejo – Mikaelo Bronŝtejn
Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburg
rakontoj pri TILE-8 kaj MLF-9
60-a datreveno de Montevideo
du studprogramoj por E-instruado en RUDN

Moskvo, 2014

enhavo

01 Mi estas kiel vi (M.Bronŝtejn)
13 La Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburg (R.Kudrjavceva)
15 Esperanto donas al mi multon (R.Kudrjavceva)
17 TILE-8
17 "Animo postulas maron" (M.Karceva)
21 Esperanto (kantoteksto de G.Mitrofanov)
21 La 9-a MLF: la sekva paŝo al rekono (I.Gonĉarova)
24 Mia partopreno en la 9-a MLF (R.Kudrjavceva)
26 La UK en Nitra kun ŝtatestra protekto kaj speciala poŝtmarko
26 Malfermita letero por REU-Estraro
27 RET-2015
28 60-a datreveno de Montevideo
28 Esperanto kaj Unesko: 60 jaroj de komunaj streboj (M.Fettes)
29 Kotizregularo de REU por 2015
30 Pagmanieroj
31 Humphrey Tonkin 75-jara
31 Du studprogramoj por E-instruado estis akceptitaj en granda rusia universitato (D.Ŝevĉenko)
32 TEJO premieris en la 41-a Malferma Tago
33 UEA invitas prelegi en la IKU-sesio
34 Rigardo al la interna Rusio deekstere (N.Gudskov)
36 Novaj diskoj de Vinilkosmo
37 "Ni laboru kaj esperu" (K.Ilutoviĉ)
39 Naskiĝtago de L.L.Zamenhof (versaĵo de K.Ilutoviĉ)
40 Kato sur pomarbo en vintro (versaĵo de N.Neĉajev)
k3 Fotoj de Aŭtuna lingvotrejnado kaj MLF-9
k4 Amuzaj misskriboj kaj eraroj
k4 FELIĈAN NOVAN JARON AL ĈIUJ!



torto por Zamenhof-tago en Bjalistoko

Ne forgesu (re)aboni REGon por 2015!

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 6 (85) decembro 2014

aperadas ekde 2000

redaktas **Georgij Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio

retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2015:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 680 rubloj, sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo "Яндекс.Деньги"

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*

elektronika abono *– 350 rub. (10 eŭr.)*

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

VIVA MEMETIEJO

MI ESTAS KIEL VI

(*21 demandoj al duonjubileanto,*
aŭ Skizo por membiografio, eble, iam verkota)

Io-tio anstataŭ prefaco

Boris Strugackij, unu el miaj plej ŝatataj homoj, diris, ke la verkisto por sia legantaro estas nur la verkoj. Ĉio cetera: edziĝoj, infanoj, oficoj, malsanoj – la privata vivo restu ekster publika prezento. Mi opinias, ke tial aperas legendoj, foje flataj, alifoje mokaj por la persono. Se oni ŝatus konstrui konojn de la legantoj pri si laŭ sia plaĉo, oni devas mem prizorgi almenaŭ parton el tiuj konoj. Do mi agu.

Miaj legantoj, kiuj ne konas mian vivon, sincere opinias, ke mi jam priskribis preskaŭ la tuton en miaj prozaĵoj. La legantaro emas identigi min kun kelkaj rolululoj, agantaj tie. Miaj parencoj kaj amikoj, kiuj mian vivon ja konas diversgrade, foje ne emas kredi min pri realeco de multaj eventoj.

Al la unuaj mi diru, ke ili bonanime trompas sin mem. Jes, mi ofte uzas certajn realaĵojn el mia vivo (lokojn, karakterojn, etosojn) kiel fonon por la priskribataj eventoj, versimilaj, sed grandparte elfantaziitaj. Unusola el miaj libroj – "Legendoj pri SEJM" estas pli vereca ol versimila, sed ja ankaŭ tio parte estas legendoj.



La duaj sciu, ke mi trompemas rilate al miaj amikoj kaj parencoj nur kiam mi ne volas kaŭzi doloron por ili, do tre malofte.

Mia rakonto estu konstruita intervjue: dum miaj publikaj prezentadoj mi ricevis aron da demandoj diversnivele prudentaj. Mi provu respondi ĉi-sube.

1. Vi kantas: "Laŭpense – rus', laŭmense – judo, kaj laŭanime – ukraino..." Kion tio signifas por vi mem?

La 38-jara diferenco laŭaĝa inter miaj paĉjo kaj panjo ne rompas la fakton, ke mi estis produktita ĝuste de tiu paro en 1949, en la ukraina urbeto Proskuriv. Post kvin jaroj okazis la 300-jariĝo de la fama kontrakto inter

la ukrainia hetmano Bogdan Ĥmelnickij kaj la rusa caro Aleksej Miĥajloviĉ Romanov pri aliĝo de Ukrainio al la Moskva carlando. Inter kelkaj stultaĵoj, faritaj en 1954 de tiama reganto Ĥruŝĉov, estis ankaŭ ŝanĝo de la nomo de mia naskiĝurbo al Ĥmelnickij.

Denaske mi estis devigita paroli tri kaj duonan lingvojn. Ne nur mi – ĉiuj infanoj de la kvartalo, kie depost la Dua mondmilito en mizeraj dometoj loĝis mur-al-mure rusaj, ukrainaj kaj hebreaj familioj. Najbaris ankaŭ du polaj, pro tio mi mencias plian lingvo-duonon. Mian hejman uzon de la jida ĉesigis la forpaso de mia patro; tiutempe mi aĝis dek kvin jarojn. Elekto de mia ĉeflingvo okazis preter mia volo: en la urbo, kie funkciis dek kvar ruslingvaj mezlernejoj kaj nur du ukrainlingvaj, mia panjo pro ia stranga kaprico aligis min ĝuste al la ukrainlingva. Tio signifas, ke ĉiujn studobjektojn oni instruis en la ukraina, sed la rusa estis fremdlingvo, por kiu ni havis kvar lernohorojn semajne. Mi forlasis Ukrainion en 1968, pli ol kvardek jarojn mi loĝas en Rusio, sed mia posedo de la ukraina, inkluzive konon de la klasika ukraina literaturo, restas sur tre bona nivelo. En la lastaj jaroj certa okazo revenigis min al la jida lingvo: mi akceptis mendon de elstara pola samideano Tomasz Chmielik – esperantigi klezmerajn kantojn de Mordeĥaj Gebirtig, do venis bezono refreŝigi miajn lingvokonojn, kaj mi faris tion.

Konklude: mi opinias, ke la tri lingvoj kaj la kulturoj, bazantaj sin sur tiuj, estas miaj denaskaj lingvoj kaj kulturoj. Pro tio ankaŭ ĉe mia traduka laboro mi ŝatus prezenti al Esperantujo ĉiujn miajn kulturojn; kelkajn projektojn ĉi direktajn mi jam efektivigis.

2. Kiam al tiuj tri lingvoj aliĝis Esperanto?

Samkiel pli ol mil infanoj mi venis en la urban Palacon de Junpioniroj en la sama jaro, kiam mi venis en mezlernejon. Mia unua okupo tie estis arta segado kaj pupfarado en rondeto, nomata "Lertaj manoj". Mi nenion sciis pri Esperanto, sed kolektadis poŝtmarkojn, do en 1961 en la sama palaco mi trovis Klubon de internacia amikeco, kie, onidire, per korespondado kun eksterlando eblis ricevi poŝtmarkojn interŝanĝe. Tiel mi konatiĝis kun la In-



A.B.Rogov

struisto, kun Andrej Borisoviĉ Rogov. Vere elstara persono, sed mi ne multe diru pri li ĉi tie, referencante al miaj “Legendoj pri SEJM”, kie mi rakontis pri li pli-malpli detale. Gravas ĉi tie, ke estis li, kiu malkovris por mi Esperanton kiel vivdirekton, do la kolektado de poŝtmarkoj iel per si mem foriris el mia vivo, sed Esperanto restis por ĉiam, efektive iĝinte mia kvara lingvo. Kaj mia kvara kulturo, certe.

3. “Ni ĉiuj iam ion studis…” Supozeble, la verkado en Esperanto ne estas via profesia okupo. Kio do?

Mia panjo ne laboris pro malsano, do la sola enspezo por la familio estis la pensio de la paĉjo. Tial post lia forpaso mi ĉesis pensi pri studentiĝo en normala taga altlernejo. Ricevinte atestilon de la mezlernejo en la aĝo 16 jaroj, mi eklaboris en loka transformatora uzino kaj studentiĝis en elektronika fako de la funkciinta en Ĥmelnickij vespera filio de Lvova Politeknika instituto. Dum du jaroj mi ŝanĝis kelkajn laborlokojn pro diversaj kaŭzoj, unu el kiuj estis Esperanto. Pri tiu mi rakontu pli detale.



En 1966 mi jam estis vizitinta du BET-ojn, helpadis mian Instruiston en la kursoj por komencantoj, ion tradukis kaj iom aktivis en la naskiĝanta SEJM. Pro tio, ricevinte proponon de la Instruisto iri kun li al E-renkontiĝo en Kievo, mi volonte konsentis. Sed la aranĝo estis okazonta dum la novembraj festotagoj, kiam mi, juna seruristo, laŭordone devus marŝi kun ĉiuj kolegoj, tenante enmane portreton de iu gvidoro, flagon aŭ afiŝon. Mi diru, ke poste mi kelkfoje plenumis tiun devon, ĉiufoje ricevante por portado la saman sloganon: “Liberon al la malliberuloj de la imperiismo!” Sed en tiu fojo la Instruisto per zorgoj de kieva esperantisto Jaroslav Matvijiŝin, aspiranto de la Sciensa Akademio, ricevis invitleteron de la Akademio, kie estis menciita ankaŭ mia nomo. Kun tiu letero mi iris al la metiejestro kaj petis liberigi min de la festa marŝado. Li indigniĝis: “Nazmukulo! Sed jam la Akademio lin vokas!”, tamen liberigis – por tri tagoj. La aranĝo en Kievo pasis brile, mi eĉ kantis tie, la unuan fojon en mia vivo mi kantis sur podio de iu kafejo en Esperanto por cento da homoj!.. Sed ni ne prizorgis la reirajn biletojn, kaj, pro manko de tiuj por la bezonata tago, foriris hejmen unu tagon poste.

Ho, la metiejestro surscenigis neimageblan skandalon, prezentante min kiel fian, orgojlan farnientulon kaj pigrulon! Mi estis senigita je mia kontentige salajrata laborista posteno kaj sendita deĵori ĉe iu fornego kontraŭ minimuma salajro. Post monato mi lasis tiun laboron, iĝinte lernanto de betonfaristo…

4. Eblas diri do, ke Esperanto certagrade rompis vian karieron… Ĉu nur tiun fojon?

Be, mi ne dirus, ke estis rompo de la kariero, kontraŭe, tiu okazo helpis min de unu flanko konvinkiĝi, ke mia ĉefokupo estas Esperanto, kaj de la alia – neniam akcepti perdon de laborloko kiel tragedion. Sed, efektive, E-okupoj kelkfoje stumbligis min ĉe miaj oficoj eĉ pli ol mia judeco. Malnova ŝerco: Negro gitarludas en metro, kantante en la jida lingvo, kaj iu preterpasanto diras al amiko: "Ne sufiĉas por li esti nigrulo…"

5. Vi diris, ke ŝanĝis kelkajn laborlokojn…

Jes, sekvis kelkaj aliaj laborlokoj, sed intertempe mi konstatis, ke normalaj tagaj studentoj povas gajni per diversaj vesperaj kaj someraj laboretoj eĉ pli ol mi gajnis per laciga tuttaga laboro, turmentante min ankaŭ per ne malpli lacigaj vesperaj studoj pri mia onta profesio. Pro tio mi decidis transiri al normalaj tagaj studoj. La decido fortiĝis, ĉar nian urban filion oni rearanĝis al memstara Instituto pri Ĉiutagaj Servoj kun fakoj pri tajlorado, ŝufarado ks. Sed min ne interesis tiuj profesioj, do mi foriris kaj ekde la aŭtuno 1968 iĝis studento de Politeknika Instituto en Tula. Ĉio ĉi post kvar jaroj kaŭzis ege strangan formulon en mia inĝeniera diplomo, mi citu: "… en 1966 studentiĝis en Ĥmelnicka teknologia Instituto pri Ĉiutagaj Servoj kaj en 1972 diplomiĝis en la fakultato pri teknika cibernetiko de Tula Politeknika instituto, ricevinte profesion – mineja inĝeniero-elektristo". Ĉu vi ĉion komprenis? Ne? Ankaŭ miaj postaj oficigantoj ne komprenis, kaj tio kelkfoje kaŭzis diskutojn ne tre agrablajn por mi,



SEJM-estraro en 1971

ĉar mi devis ĉiufoje detale klarigi la kaŭzon de tiu formulo.
Cetere, en Tula Politekniko funkciis ankaŭ fakultato de sociaj profesioj, al kiu mi aliĝis tuj, veninte al mia nova studloko. Post du jaroj mi ricevis diplomon de ĵurnalisto kaj oficon de eksteretata raportisto en la regiona junulara ĵurnalo "Molodoj kommunar" (Juna komunano). Restante studento pri elektro, mi ne povis plentempe dediĉi min al verkado de artikoloj, tamen mi faris multajn, ĉar la honorarioj, tiutempe solidaj, estis grava aldono al mia studenta stipendio. Unu el miaj grandaj artikoloj pri problemoj de studenta grupo eĉ ricevis premion de Tula Komsomolo.
Duonjaron antaŭ mia diplomiĝo kiel inĝeniero mi ricevis proponon pri enetata oficado de la sama ĵurnalo. Sed, finkonsciinte al tiu momento, ke teda raportado pri komsomolaj konferencoj ks ne estas tio, kion mi ŝatus fari konstante, mi rezignis, kaj post la diplomiĝo mi neniam laboris kiel profesia ĵurnalisto. Mi elektis elektron.
Ĉi tie mi diru krome, ke dum mia studado mi konatiĝis kun kelkaj seriozaj kaj gravpostenaj kontraŭuloj de Esperanto. Ĉiu el ili laŭ siaj povoj bremsis aktivecojn de nia studenta E-klubo, forĵetadis miajn priesperantajn artikolojn el jam prespretaj ĵurnaloj, malpermesis inviton de priaj prelegantoj ktp. Sed mi estis bona studento en mia fakultato, kaj la klubo efektivigis videble utilan internacian edukadon, do gravajn damaĝojn mi sukcesis eviti.


en Vorkuta

6. Ĉu elektro iĝis via posta salajrata okupo por la tuta vivo?
Ne. Sed ja grandparte. Post la diplomiĝo ekde 1972 ĝis 1982 mi oficis kiel inĝeniero pri elektro en la filio de leningrada granduzino Kirovskij en Tiĥvin. Poste mi venis al mia laŭdiploma profesio: en la karbominejo "Komsomolskaja", en la urbo Vorkuta mi laboris en diversaj inĝenieraj postenoj, ligitaj kun elektro. Ekde 1990 ĝis 1994, reveninte al Tiĥvin, mi estis ĉefelektristo de plastvara uzino. Do sume dum 22 jaroj elektro estis mia ĉefokupo. En 1994 mi iĝis direktoro de la sama plastvara uzino kaj dum la lastaj dudek jaroj direktoris sinsekve en kelkaj firmaoj, ricevante tamen pro ekstra prizorgo de elektro-aferoj certan kromsalajron. Nun per mia pano min provizas direktorado en negranda arbarsega entrepreno.

7. Sed Esperanto?

Mi kuraĝe asertas, ke vivteni sin per Esperanto-okupoj povas (aŭ scipovas) nemultaj homoj en la mondo, kaj mi ne apartenas al tiuj. Memkompreneble, mi ricevas honorariojn pro miaj libroj kaj KD-oj, sed tio estas ne pli ol kvin procentoj de miaj enspezoj. Poŝmono, kiun mi foj-de-foje ricevas dum miaj prelegvojaĝoj, sufiĉas por aĉeti suvenirojn kaj donacetojn, kiujn mi portas al miaj amikoj el la samaj vojaĝoj. Cetere, estis unu okazo, kiam Esperanto grave subtenis min kaj mian familion. En 1993, dum kelkaj monatoj restanta sen salajro (multaj tiam same fartis en Rusio), mi ricevis inviton por la unua granda prelegvojaĝo en Francio. Ŝparante la poŝmonon kaj vendante en la vizitataj E-kluboj miajn librojn kaj KD-ojn, mi revenis hejmen kun sumo, kiu fakte helpis la familion elvivi.

8. Ĉu estis granda la familio?

Ne. La panjo, kiu vivis kun mi dum la lastaj jaroj de sia vivo, tiutempe jam estis forpasinta. Restis la edzino kaj la filo, kiu tiam estis mezlernejano. Nun li loĝas kaj laboras en Peterburgo.



kun la filo

9. Ĉu viaj familianoj posedas Esperanton?

Certanivele jes. La edzino Tatjana estis mia kursanino, kiam mi instruis la lingvon en Tula Politeknika Instituto. Mia filo Marko lernis Esperanton memstare kun mia ioma helpo. Ambaŭ partoprenis kun mi kelkajn gravajn E-aranĝojn; en UK en Tampereo (1995) la edzino eĉ gvidis kurson pri makramo (nodplektado), vizititan de ĉ. 20 diverslandaj esperantistinoj.

10. Ĉu en viaj prielektraj oficoj vi havis malagrablaĵojn pro Esperanto?

Jes, kelkfoje. En ĉiuj miaj oficoj miaj ĉefaj gvidantoj estis kontentaj pri mia laboro, kaj Esperanto ne malhelpis min plenumi miajn oficajn devojn senriproĉe. Sed krom la ĉefaj gvidantoj estis apudaj. Ekzemple, en Vorkuta la direktoro de la minejo, kie mi gvidis elektristan skipon, estis mia bona amiko, sed la ĉefinĝeniero ne tre ŝatis min. En 1987 mi organizis E-kurson en la loka kulturdomo, do tiu ĉefinĝeniero aperte diris, ke Esperanto kaj gvida laboro estas nekunigeblaj. Mi fajfis pri tio, sed kiam ektemis pri altigo de mia rango de kapitana al majora (en la ministerio pri karba indus-

trio la etata sistemo estis duonmilitista, samkiel ĉe la fervojoj), li kaŝe malrekomendis al la supera estro fari tion, kaj mi restis kapitano. Tio tamen ne tro ofendis min.



jubileo de S.N.Podkaminer en 1981

11. Dum jardekoj vi direktoras, do estas gvidanto de kolektivoj. Kial vi ne okupiĝas pri gvida kaj organiza laboro en E-movado?

En juna aĝo mi partoprenis tiujn laborojn, aktivante en la gvidorganoj de SEJM kaj partoprenante en organizo de kelkaj amasaj aranĝoj, i.a. de SEJT-18 en 1976 apud Tiĥvin. Refoje mi referencu al "Legendoj pri SEJM" – tie estas ĉapitro pri la afero. Nun, dediĉante plejparton el miaj liberaj horoj al verkado kaj traduka laboro, mi simple havas nek tempon nek emon por labori en iaj gvidorganoj. Ŝajne, eĉ sen tiu laboro mi rajtas opinii min aktiva esperantisto, ĉu ne?

Cetere, mi estas konvinkita, ke agado en ajnaj gvidorganoj estas ne mia afero. Oni ofte svatas min iĝi deputito en tiu aŭ alia nivelo de lokaj konsilioj – urba, regiona… Mi ĉiam respondas, ke en la politika historio de Rusio jam estis unu gvida Bronŝtejn (Trockij – *La red.*), kaj tio plene sufiĉas almenaŭ por unu jarcento.

12. Sed ankaŭ nun vi organizas amasajn aranĝojn por esperantistoj. Ĉu oni nomu tion speciala hobio?

Oni rajtas nomi tion mia hobio diference de la verkado-tradukado, pri kiu mi okupiĝas serioze tri-kvar horojn preskaŭ ĉiutage. Sed organizo de amasa aranĝo estas ne solula, sed teama laboro. Mi ŝatas esti ano de laborema amika teamo



en Vilnuso en 1975



(ne gravas ĉu kiel gvidanto, aŭ kiel respondeculo pri iu parto de la programo), kiu preparas feston por Esperantujo. Ja bone organizita renkontiĝo estas vera festo, ĉu ne? En Tiĥvin mi havas tian teamon, kaj, miaopinie, ni ne devas honti pri OkSEJT (1999), RET (2004), REK-EoLA (2007) nek pri du TEMoj (2009 kaj 2014). Similan teamon de komprenemaj samideanoj (en la senco kaj esperantista, kaj ĝuste organiza) mi trovis en la jarŝanĝaj Internaciaj Festivaloj de Hans-Dieter Platz, la ĉeforganizanto. Tie mi dum dek kvar jarŝanĝoj prizorgas parton de la programo. Alia situacio estis en Universalaj Kongresoj, kien nome de UEA mi estis kelkfoje invitita por koordini la Artan Programon (Tampereo-1995) aŭ la Internacian Vesperon, aŭ ion similan (Vieno-1992, Tel-Avivo-2000, Bjalistoko-2009). Bedaŭrinde, tie mankas komprenemo kaj interhelpo en la organiza teamo, kaŭze de tio UK estas ne unueca aranĝo, sed aro de apartaj sendependaj programeroj pli aŭ malpli bonaj…

13. Do vi iom malŝatas UEA – kial?

Estas miskonkludo. Mi ŝatas Universalan Esperanto-Asocion, kiel kernan organizaĵon de nia Movado. Mi vidas ĝiajn funkciojn en kunordigo de eventoj en la tutmonda Esperantujo, en reprezentado de ni, esperantistoj, ĉe la eksteraj organizaĵoj – ĝis la plej alta mond-nivelo, en genero de novaj ideoj por evoluigo de la Movado ktp. La membrokarton de UEA mi ricevis en 1976 dank' al asisto de Boris Kolker pere de la fondaĵo Canuto, do dum 38 jaroj mi restadas fidela membro de tiu estimata asocio. Alia afero – la gvidantoj. Mi estimas la nunan gvidteamon de UEA, sed kun nostalgia bedaŭro mi rememoras la tempojn, kiam tie estis Humphrey Tonkin, Simo Milojeviĉ, Nikola Raŝiĉ…



14. Vi estis fondinto de kelkaj esperantistaj kluboj…

Tiu aserto taŭgas ne por ĉiuj okazoj en mia

vivo. Mi konsentu, ke per mia eka ideo kaj laboro estis fondita la junulara klubo "Velo" en Ĥmelnickij, la klubo en Tula Politeknika Instituto, kaj lernejana klubeto "Lampiro" en Tihvin. Mi ne kuraĝus ekagi en la urba skalo en Tiĥvin, se ne aperus du brilaj aktivuloj – Aleksandro Kogan kaj Vladimir Gakalenko. Aleksandro fakte faris por la fondo de la urba klubo en Tiĥvin pli multe ol mi. En Vorkuta la klubon fondis tute ne mi, sed mia lernantino Julia Dmitrievskaja. Ĉiuj menciitaj kluboj, krom la Tiĥvina, ne plu funkcias pro diversaj kaŭzoj, kaj mi preferas opinii min nur instruisto, ĉiufoje preparinta homan bazon por apero de la organizita movado surloke. Se ĝi aperis kaj vivas – bone. Se ĝi malaperis, mi kontentas, ke miaj lernintoj tamen plu aktive uzas la lingvon por siaj bezonoj.

15. Ĉu ankaŭ nun vi instruas?

Jes ja. Domaĝe, sed multaj tiĥvinanoj emas forlasi la urbon diverskaŭze. En la pratempo instruis Volodja Gakalenko, Saŝa Kogan – la unua forpasis, la dua elmigris. Ho, eĉ antaŭ kelkaj jaroj ni havis tri instruantojn en la klubo: Viktoro Kandalinskij, Zoja Kaĉalova, Julinka Litvinova. Ili ĉiuj forlasis la urbon…

La 29-an de septembro mi komencis novan kurson por ok komencantoj. Kun espero, ke iuj el ili restos en la klubo.

16. Kiam vi komencis verki en Esperanto?

Preskaŭ tuj post la eklerno. Infanaĝe mi faradis provojn versi en la rusa kaj la ukraina, do kial mi ne provu ankaŭ en Esperanto? Dek du jarojn mi havis tiam, en 1961, do rezultis io-tio: "*Smeralda stelo nia, vi por ni brilas hele, kaj lingvon Esperanto ni lernas tre fidele…*". Aŭ ia simila stultaĵo, mi ne plu memoras. Sed estis grave, ke la Instruisto aprobis miajn provojn – ankaŭ pri la unuaj tradukoj de miaj ŝatataj kantoj. Unu tradukon li eĉ sendis al fama E-poeto Bencion Berin en Vilnius, kaj mi ricevis de tiu kvarpaĝan detalan analizon pri mia fuŝlaboro – kun aprobo kaj kritiko, tamen ja kun kuraĝigo por pliaj provoj. Vere estis bona leciono por mi kaj bona instigo. Tiom bona, ke kvin jarojn poste, en 1966,



mia aroganteco atingis necesan nivelon por la decido eldoni literaturan revueton kun romantika nomo “Velo”. Dum tri postaj jaroj mi okupiĝis pri tio, dissendante dek kvin tajpitajn ekzemplerojn al kelkaj E-kluboj. Ene de tiu periodo mi ricevis utilajn lecionojn, eĉ se epizodajn, de veraj spertuloj: Konstantin Gusev, Jefim Zajdman, Danielo Kolker, Vitas Ŝilas, – kiujn mi akceptis kun atento, estimo kaj danko.

17. Vi gvidis kursojn pri tradukarto en diversaj renkontiĝoj esperantistaj. Ĉu vi posedas specialan kleron por tio?

Mi aŭdis diraĵon, ke en la Literatura Instituto oni ricevas diplomon de profesia verkisto… Mi ne havas tiun. Pro tio mi gvidis ne kursojn, sed seminariojn aŭ studiojn, se vi volas. Por esti bona tradukisto oni bezonas internan senton pri ambaŭ lingvoj, certan kulturan nivelon kaj ĉevalan laborkapablon. Ĉio cetera venas kiel sperto. Mi havas certan kvanton da tiu kaj volas faciligi memedukiĝon de komencantaj tradukistoj, transdonante ĝin al ili. Memedukiĝon, mi diris, jes. Krom skrupula elektado de taŭgaj vortoj kaj nocioj oni, certe, devas ion lerni de la spertuloj mondkonataj. Mi opinias ke tre utila por mi estis memstara kaj libervola studlegado de la teoriaj verkoj pri tradukarto de Jiří Levý, Kornej Ĉukovskij, Jefim Etkind, Nora Gal kaj aliaj majstroj.

18. Kiom da libroj vi produktis ĝis nun?

Mi ne produktas librojn. Ĉiu libro estas produktaĵo de teamo, kiun eniras desegnistoj, redaktoroj, provlegantoj, presejistoj... kaj mi, kiel aŭtoro aŭ tradukinto de la teksto. Pri la kvanto – mi ne scias, kiel oni kalkulas… ĉu reviziita reeldono estas la sama libro? Mi povas diri, ke mia unua libreto “Cirko de animaloj” aperis en 1963, do mi aĝis tiam 14 jarojn. La ideo estis de mia Instruisto Andreo Rogov: li proponis ke mi faru versaĵetojn por ĉiu bildo el tiama porinfana bildserio. Mi faris. La libreto centekzemplere fote eldoniĝis en Moskvo dank’ al Aron Zisman, kaj mian unuan honorarion mi elspezis por vojaĝo al BET. Cetere, ĝuste por tio la libro estis eldonita.



Ankaŭ la duan libron mi memoras. Ĝi aperis en Ufa, en 1980 kun la nomo “Kantoj de Mikaelo Bronŝtejn”. Boris Kolker iniciatis tion.

Sed ekde la 1992-a eldoniĝis kelkdeko,

plejparte ĉe "Impeto" en Moskvo. Interalie, sep poemaroj (kvin en Esperanto kaj du en la rusa), tri romanoj k.a. La plej populara el inter miaj libroj estas, certe, "Mamutido Miĉjo". Tiu fabeleto por komencantoj eldoniĝis trifoje, kaj nun estas planata la kvara eldono. Dank' al la instruvojaĝoj de miaj bonaj amikinoj Tatjana Loskutova kaj Gražina Opulskienė la libreton oni legas en Albanio, Aŭstralio, Novzelando, Indonezio...



Mi estas tre kontenta pro la kunlaboro kun "Impeto", kaj mi esperas ke la kontento estas reciproka.

19. Neevitebla demando: kion vi verkas nun?

Ĉi-jare finfine mi trovis la internan forton por reveni al la romano, kiun mi ekverkis antaŭ ses jaroj. La periodo dudekjara inter 1918 kaj 1938 kun la amasa E-movado sovetia, bruske pereinta en la diabla kaldrono de la Granda Purigo, delonge interesis min. Mi havis bonŝancon paroli kun multaj esperantistoj transvivintaj tiun epokon – Ints Ĉaĉe, Elio Kiseljov, Samson Kletenik, Fjodor Kulagin, Antanas Poŝka kaj multaj aliaj. Mi trovis kaj akumulis ege raran gazetkolekton tiutempan. Sed mankis la interna forto, do la verkoprovoj iris en mian tirkeston por longe. Dum tiuj ses jaroj mi verkis "Urbon Goblinsk" kaj multon alian…

Nun estas verkitaj tri el sep planitaj partoj; mi esperas, ke la akirita interna forto sufiĉos por la finverko – se ne en la kuranta jaro, do nepre en 2015.

20. Via aktiva prelegvojaĝado ankaŭ malhelpas, ĉu ne? Tamen, kiel vi venis al tiu okupo?

Vidu, en la sovetia tempo mi estis t.n. "nevijezdnoj" ("neelvetura") – neniam oni permesis mian eliron el la lando, krom la vojaĝo al UK en Varna (1978) kiam la fama aŭtoritato Semjon Podkaminer sukcesis trabati la permeson por mi.

En 1991 mi la unuan fojon



iris okcidenten – en Francion tutfamilie. Nin afable invitis Esperanto-amikino de mia edzino. Absolute hazarde dum tiu vojaĝo mi trafis al la Kultura Esperanto-Festivalo en Parizo. La programo de la festivalo estis plenplena, sed dank' al interveno de Ĵak Le Puil oni permesis al mi prezenti tri kantojn. Post la prezentado s-ino Claude Nourmont tuj proponis al mi viziti koncerte kelkajn francajn E-klubojn, sed mi ne povis lasi la familion, kaj ni revenis hejmen. La turneo en Francio okazis du jarojn poste, en 1993 kun 21 urboj vizititaj. Ĝi estis mia unua turneo. Sekvis multaj aliaj, ĉar ne mankis la invitoj. La turneoj okazis preskaŭ en ĉiuj eŭropaj landoj, ankaŭ en Usono.

Je la fino de 2012 mi komprenis, ke la vagado tra la mondo kun valizo kaj gitaro iĝis tro laciga por mi. Sekve aperis decido fini la turnean agadon tie, kie mi ĝin komencis, – en Francio. Des pli, ke antaŭ dek jaroj, dum mia dua granda turneo tie, la francoj demandis, kiam mi revenos, kaj mi promesis reveni post dek jaroj. En januaro 2013 okazis la turneo kun 18 vizititaj urboj, kaj mi deklaris publike, ke mia turneado venis al la fino. La francoj tamen demandis, ĉu mi ŝatus fari escepton por Francio – post dek jaroj. Kial ne? – mi respondis. Se en 2023 mi estos viva, pli-malpli sana kaj kapabla moviĝi sen helpo de aliaj – kial ne?

Do. Mi ne turneas jam preskaŭ du jarojn. Dum la antaŭaj dudek mi estis elspezanta por la turneoj mian ĉiujaran feritempon – ja mi plu oficas. Sed la espero, ke nun mi havos normalan feriadon kun ĉemara kuŝado ventr-al-sune, ne efektiviĝis. Anstataŭ la invitoj turnei komencis alveni amase kaj atake multnombraj invitoj prelegi kaj kanti en diversaj E-aranĝoj. Ne, ne tiel – ili venadis ankaŭ antaŭe, sed pro la turneoj mi ne havis tempon por ili. Nun la tempon mi ekhavis, kaj la invitoj venis de homoj, alte estimataj de mi, nerifuzeblaj. Ve, anstataŭ unu aŭ du turneoj aperis do por ĉiu jaro kvin – ses aranĝoj por viziti. Tia sorto…

21. Sed ni tute ne parolis pri viaj kantoj…

Kial ni parolu pri ili? Ili vivas sian vivon, kelkajn eĉ ŝatas kanti la verda popolo, kaj tio, verdire, donas al mi specialan fieron.

La demandojn kolektis kaj respondis Mikaelo Bronŝtejn, septembro 2014



LA AŬTUNA LINGVOTREJNADO EN JEKATERINBURG

La 1-an – 4-an de novembro 2014 en Jekaterinburg pasis la Aŭtuna lingvotrejnado. Ideo pri ĝi aperis ankoraŭ printempe, dum EsPrimo-10, kaj plifirmiĝis somere, kiam mi partoprenis SES-on en Apudmoskvo. Tiu trejnado ŝajnis al mi tre grava kaj por novuloj, ĉar ĝi povus helpi al ili pli libere ekparoli Esperante, kaj por jam malnovaj esperantistoj, kiuj povus malkovri novajn lingvajn tavolojn de Esperanto, pli profunde koncepti ĝin.

Mia porviva moto estas "Ne sufiĉas voli, necesas agi!" – tial mi komencis paŝon post paŝo realigi la ideon, tre zorgeme elektante la organizan teamon, ĉar mi opinias, ke teamo estas bazo por ajna sukcesa aranĝo. Ĝin eniris spertaj kaj agemaj personoj de nia regiona Esperantujo: Vladimir Opletajev, Aleksandr Osincev, Oljga Ŝiljajeva, Roman Jefremov, Pavel Veselov, tial facile naskiĝis brilaj pensoj por la programo de la trejnado kaj allogaj programeroj, kaj fine rezultis utila, tute ne enua, vivplena aranĝo.



En la centro de la scenaro kompreneble estis la praktika lingva ekzercado, kiu okazis en la A-nivela kaj B-nivela grupoj. La unuan gvidis Aleksandr Osincev, esperantisto kun senlima homa fascino, tre elpensema, vigla kaj komunikiĝema. En lia grupo estis 10 lernantoj, plejparte tiuj estis novuloj. La duan grupon kun 9 partoprenintoj gvidis Vladimir Opletajev, granda entuziasmulo de instruado kaj klerigado en nia regiona E-movado; por mi persone li estas modelo de instruisto, kaj mi plezure ion lernas de li. La celoj de la proponitaj kursoj kompreneble diferenciĝis: la tasko de la A-nivela kurso estis paroligi freŝbakitajn esperantistojn, dum la B-nivela kurso oni havis la ŝancon pli profundiĝi en apartajn gramatikajn kaj leksikajn temojn de la lingvo, klarigi por si iujn nuancojn kaj detalojn de la lingvouzado. Ambaŭ kursgvidantoj preparis kaj gvidis tre interesajn lecionojn por kiuj estis akumulita varia materialo. Ili lerte uzis diversajn formojn de ekzercado, kio absolute ne lacigis la kursanojn kaj ebligis ĉiam reteni ties atenton. Ĉiuj vizitintoj de la A- kaj B- nivelaj kursoj ricevis la certigilojn de partoprenintoj de la Aŭtuna lingvotrejnado. Krom la kursanoj kaj la organizantoj estis ankaŭ sep diver-



surbaj gastoj, kiuj sen enmiksiĝo observis la ekzercadon deflanke kaj povis partopreni kulturklerigan programaron. Entute la trejnadon partoprenis 32 personoj el 10 urboj de Rusio. Krom la specialaj instruhoroj en la programo multis diversaj lingvaj kaj distraj societaj ludoj, kiuj ankaŭ helpis evoluigi la parolkapablojn. Roman Jefremov el la urbo Glazov proponis por ĉiuj partoprenantoj plurajn atentokaptajn, viglajn ludojn, kiujn li brile gvidis: "brajn-ringo", "pentristoj", "metiejo pri goo" k.t.p. Oljga Ŝiljajeva, aktivulino de TEJO, ofertis por la programo interesajn klerigajn programerojn: TEJO-horo, prezentado de la revuo "Kontakto", rakontoj pri la latinamerikaj vojaĝoj al la 99-a UK en Bonaero kaj la 70-a IJK en Fortalezo.

Ankaŭ dum la vesperoj ni havis riĉan kaj interesan programon, kiun multaj kunorganizis, kaj ĉiuj partoprenis belajn amikan kaj poezian vesperojn, feston de la aŭtunaj naskiĝintoj, programeron, kiu nomiĝis "Historioj pri feliĉoj", diskutrondon pri la kantado "Kial ni kantas?". Sed tre gravas, ke dum la tuta programo ni praktikis Esperanton per diversaj metodoj: ekzercado kun la kursgvidantoj, priskribado de bildoj, prezentado de rolludoj, deklamado kaj teatra improvizado, elpensado de historioj, aŭskultado de tekstoj, partopreno en multaj diversaj ludoj, kantado. Kaj mi esperas, ke nia ĉeesto en la komuna spaco estis ne simple ripozo kaj distro, sed ni foriris post la trejnado kun pozitivaj ŝanĝoj en nia lingvoposedo.



Tiuspeca aranĝo por nia regiona E-agado estis la unua provo, eksperimento. Mi opinias, ke entute ni havis bonan starton, okaziginte sukcesan E-trejnadon, kvankam mi persone dum la organizado havis ankaŭ iujn sen-

reviĝojn. Ekzemple mi atendis, ke en multaj niaregionaj urboj okazos aŭtunaj E-kursoj kaj la kurs-finintoj multnombre partoprenos la tre-jnadon. Sed tiuj be-daŭrinde ne tre mul-tis. Tamen min tre ĝojigis, ke aktive partoprenis en la aranĝo moskva E-grupeto. Ekdekomence la iniciaton serioze subtenis Irina Gonĉarova, aliĝinte kiel unu el la unuaj kaj tre atentis nian provon. Ŝi venigis trikapan grupeton de siaj lernantoj, freŝfinintojn de la E-kurso "Faru la rondon", tre simpatiajn, aktive evoluantajn en Esperanto gejunulojn, kun kiuj ni volonte amikiĝis. "Ni ankoraŭ venos al vi!" – diris Karter (Aleksandr Basov) – kaj tio estis la plej bona komento al la okazinta evento.



Sed ja tre gravas perspektivoj de la projekto: estus certe bone, ke ĝi ne finiĝu per unu provo, male – tre bezonatas, laŭ mi, ke ĝi okazu pli regule kaj ni pripensu kiel ĝin plibonigi, fari utila kaj por novuloj kaj por spertuloj. Ja eĉ la esperantistoj, kiuj, kiel mi, jam delonge okupiĝas pri Esperanto, deziras kleriĝi, perfektiĝi en la lingvo. Mi estas tre dankema al Irina Gonĉarova, kiu proponis kune daŭrigi la aferon: intermite organizante la trejnadon jen en Moskvo, jen en Jekaterinburg. Tre pripensinda propono!

Por la fino mi nepre ŝatus kore danki ĉiujn kunorganizantojn, kiuj sindone laboris por la sukceso de la aranĝo kaj senriproĉe plenumis siajn taskojn. Inter vi, miaj karaj amikoj, mi sentis veran interkompenemon kaj grandan emocian entuziasmon!

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

ESPERANTO DONAS AL MI MULTON!

Ofte mi ŝerce diras, ke Esperanto vivas kun mi, kun mi manĝas, dormas, okupas mian cerbon… Sed nia Lingvo reale tioman multegon donas al mi! Ĝi donas pliajn fortojn, kiam al mi ŝajnas, ke mi jam plene elĉerpiĝis, portas konsolon en plej malĝojaj momentoj de mia vivo kaj donacas tiom da feliĉaj tagoj, horoj, minutoj, tiom da neforgeseblaj renkontiĝoj, tiom da bonkoraj, sinceraj kaj tre fidindaj amikoj!

Nun mi ŝatus rakonti pri ankoraŭ unu tute mirinda vespero el la las-



tatempa vivo, ligita certe kun Esperanto, kun miaj E-amikoj, sed ne nur… ankaŭ kun belega muziko! Mi ŝatas muzikon, tion scias ĉiuj miaj amikoj, kun la esperantistoj de nia E-klubo "Arĝenta Flamo" mi ofte vizitas la urban filharmonion, tieajn bonegajn koncertojn. Dum unu el niaj vizitoj tien, ankoraŭ septembre, mi rapide trarigardis la estontan koncertan programon de la filharmonio sur la granda afiŝo, kaj kion mi vidis? En la programo – koncerto de Andrej Korobejnikov por la 7-a de novembro! Kompreneble mi ĝoje sciigis la amikojn-esperantistojn dum nia septembra klubkunveno, kaj ni decidis nepre viziti la koncerton de Andrej kune. Decidite – farite: rapide estis akiritaj biletoj por nia tuta nemalgranda kompanio (ĝenerale ĉiuj biletoj por la koncerto estis jam elaĉetitaj en kasoj longe antaŭ la koncerto).

Ni komencis senpacience atendi la eventon. Dume mi rakontis al miaj samklubanoj, kiuj neniam antaŭe renkontiĝis kun Andrej, ĉion, kion mi mem sciis pri lia neordinara vivsorto. Ĉar la koncerto estis okazonta du tagojn post la "Aŭtuna lingvotrejnado", mi ankaŭ skribis al Irina Gonĉarova, proponante kapti la bonŝancon kaj resti en nia urbo por kelkaj tagoj post la trejnado cele viziti ankaŭ la koncerton. Ŝi tuj aliĝis kune kun sia lernantino, esperantistino Mildina (Natalja Laziĉ).

Jen venis la longe atendata tago – la sepa de novembro, ekde la mateno ni ĉiuj estis feste agorditaj, preparis belajn vestaĵojn, antaŭ la koncerto mi vizitis florbutikon kaj aĉetis tie tre belan bukedon por donaci ĝin al Andrej.



Je mia ĝojo, kiel memoraĵon, mi trovis ankaŭ etan, sed vere belan orkoloran, metalan kopion de koncerta piano kun la juveletoj de Svarovski sur ĝia klaptabulo.

La vespero estis vere mirinda! Nia bela esperantista grupo, 16 jekaterinburganoj kaj 2 moskvaj gastinoj,

renkontiĝis en la urba filharmonio. Andrej koncertis duete kun la same tutmonde fama violonisto Dmitrij Maĥtin. Ilia dueto nun turneas tra la mondo, plenumante belegan muzikon. En nia koncertejo en la plenumo de la duopo sorĉe sonis sonatoj de Beethoven, Mozart, Schubert. Sed multajn el ni plej impresis la tre emocie plenumita sonato de Prokofjev. Fine de la koncerto mi kuris al la scenejo kun la bukedo de floroj por Andrej de jekaterinburga esperantistaro.

Post la koncerto ni, memore pri la evento, fotiĝis kun la muzikista dueto, sufiĉe longe parolis kun Andrej Esperante, rakontis al li niajn impresojn, ĉiuj dezirantoj povis preni aŭtografojn de la muzikistoj. En la kapo konserviĝis ankaŭ jena amuza bildo: nekonata viro, kiu aliris kun sia juna kunulino al Andrej dum ni, esperantistoj, interparolis kun li, ankaŭ petis la aŭtografon kaj konfesis, ke li por la unua fojo vizitas la filharmonion, ke li estas tre forte impresita kaj por li tio estos neforgesebla vespero. Andrej ridante respondis, ke jen muziko kapablas krei tiajn miraklojn. Ĉu mi aldonu, ke ankaŭ por ni ĉiuj tiu vespero estis mirakla kaj iĝis neforgesebla?!

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

TILE-8


Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto – 8 sukcese pasis en Soĉi la 31-an de oktobro – 8-an de novembro 2014. La E-aranĝon partoprenis 34 personoj: 10 personoj el Soĉi, po 3 personoj el Jalta kaj Mahaĉkala, po 2 personoj el Krasnaja Poljana, Uljanovsk, Dimitrovgrad, Taganrog, Krasnodar, Kislovodsk, Nevinnomissk, po 1 persono el Gelenĝik, Volgograd, Tomsk, Stavropolj. Okazis riĉa turisma kaj kultura programo: ekskursoj al la Olimpika parko, al Roza-Ĥutor / Krasnaja Poljana, vizito al Muzeo de Pentroarto, la fermo de la kinofestivalo "Kinotavrik", koncerto de orgena muziko en Soĉia orgena halo, seminarioj pri la E-movado kaj uzado de Esperanto, ekzercado de Esperanto ktp.

<reu-agado>

"ANIMO POSTULAS MARON"



Tiu frazo de Geĉjo Basov tre plaĉis al ĉiuj klubanoj de uljanovska regiono, kiuj partoprenis komence de novembro tradician renkontiĝon en Soĉi TILE-8. Al ni plaĉis ankaŭ



la vortoj de ĝiaj organizantoj: “Laŭ via plaĉo ni povas ŝangi la programon je via plezuro” (REGo, № 5 (84), p. 14). Do, ni decidis!

Pro multaj obstakloj ni aperis en la bela urbo nur la 1-an de novembro kaj ne povis partopreni la solenan malfermon, kiu okazis en la bazejo “PrimaVero” (sonas Esperantlingve, ĉu ne?). Tamen estis tre agrable ekvidi ĉe urba stacidomo la ĉeforganizanton de TILE Vladimir Bespalov kaj niajn geamikojn, geedzojn Ljubovj Skoraja kaj Gennadij Mitrofanov el Taganrog, kiuj varme salutis nin.

Dum du tagoj ni forestis en la urbo pro tuttagaj ekskursoj: la dimitrovgradanoj vizitis tean plantejon kaj Olimpikan Parkon, kaj la uljanovskanoj vojaĝis al Krasnaja Poljana kaj al Abĥazio. Ŝajnas, ke ambaŭ ekskursoj jam estis priskribitaj de samideanoj, kiuj vizitis tiujn du objektojn pli frue. (Pri kavernoj en Novij Afon, ekzemple, jam skribis nia klubanino Tatjana Kuzjmina en REGo, № 6 (61), p. 8). Tamen mi volus skribi kelkajn vortojn pri malpli konataj vidindaĵoj. Pri Blua lago kaj tiel nomata “ŝtona sako”.

Survoje al Rica-lago ni haltis ĉe mirinda lago, kies belecon oni ofte komparas kun brilanta safiro en kruda montŝtona muntaĵo. Ĝia surfaco estas trankvila, kvankam videblas, ke apude el sub la roko brue enfluas plenakva monta fluo. Neniu scias pri ĝia profundo precize (onidire ĝi atingas 76 m). Ĝi ne glaciiĝas tutjare, tamen en ĝi ne loĝas fiŝoj. La lago ne senkoloriĝas kaj ne malheliĝas, eĉ se malbonveteras. Ĝia koloro estas ĉiam mirinde blua. Pri ĝia deveno ekzistas multaj legendoj. Oni filmis ĉi tie kelkajn epizodojn de la filmo “La tero de Sannikov”. Ekzistas popolkredaĵo: kiu lavos sin per la akvo de la Blua lago, tiu iĝos pli juna. Do, ĉiu kunportas la lagan akvon hejmen.



“Ŝtona sako” estas Jupŝara kan-

jono, kie du vertikalaj rokoj preskaŭ interproksimiĝas apud la tero tiel, ke restas nur mallarĝa vojo. Oni diras, ke dum konfliktoj tiu vojo estis minita. Ĉie tie estas ĉiam pli malvarme ol en ĉirkaŭaĵo, ĉar la suno aperas en tiu intermonto malofte. La longeco de la "ŝtona sako" atingas preskaŭ 8 km, la alteco – preskaŭ 500 m. Turistoj sentas sin en la kanjono ne tre komforte. Tamen ili ĝuas tiun naturan vidindaĵon.

La programo de la renkontiĝo estis bone planita. Post matenmanĝo la bazejanoj veturis al la centro, kie estis diversaj interesaj ekskursoj: tra la fama parko "Rivjera", al la muzeo de N.A.Ostrovskij (antaŭ la 7-a de novembro), al Arbo de Amikeco, al Arta muzeo k.t.p.

Mi sukcesis ĉi-jare viziti muzeon de V.Barsova. Pri tio mi revis dum ses jaroj. Mi eksciis, ke Valerija Vladimirovna Barsova, lirika sopranulino, naskiĝis en la jaro 1892 en Astraĥanj. Ŝia fratino, M.V.Vladimirova, instruis kantadon al ŝi. Poste Valerija lernis en Moskva konservatorio kaj finis la studadon en la jaro 1919. Ŝi debutis en operejo en 1917. En la jaro 1919 kune kun fama basulo Fjodor Ŝaljapin ŝi kantis en opero "La barbiro de Sevilo". Kiel Rosina ŝi aperis unuafoje ankaŭ sur scenejo de Granda Teatro (1920). Ŝi kantis tie ĝis la jaro 1948. Ekde 1929 ŝi koncertis eksterlande kaj sukcese prezentis siajn kapablojn. Eksterlandaj ĵurnalistoj kaj muzikkritikistoj nomis ŝin "rusa najtingalo", ĉar ŝia unika voĉo estis tre bela kaj la kantistino brile posedis kantan teknikon. Ŝia tenera, sed forta voĉo konkeris multajn korojn. Ŝia koncerta repertuaro enhavis 600 diversajn muzikaĵojn. Aprile 1947 ŝi forlasis Grandan teatron kaj transloĝiĝis al Soĉi, kie loĝis dum 20 jaroj. Post ŝia morto (1967) en tiu domo funkciis urba porinfana arta lernejo, kaj la 9-an de januaro 1988 la vilao de la kantistino iĝis muzeo. En la muzeo eblas aŭskulti la registraĵojn de ŝia kantado, kiuj jam delonge iĝis raraĵoj.



Necesas diri, ke kultura parto de la TILE-programo estis enhavriĉa. Irina Polesĉuk zorgis pri biletoj por multaj koncertoj laŭ nia deziro. Kaj kelkaj el ni vizitis koncerton de Biser Kirov aŭ solenan fermon de porinfana filmfes-

tivalo “Kinotavrik”. Floran ekspozicion en la halo de sanatorio “Svetlana” nia sesopa teamo vizitis en akompano de Vladimir Derevjanko, kiu donacis al ni grandan bongustan memfaritan torton. Samtempe en la ekspozicia halo eblis rigardi bildojn de pentristo Ĉernij. Larisa Soniĉeva gvidis multajn el ni al la geologia muzeo. Tatjana Davidova multe scias pri la urbo kaj rakontis novajn faktojn pri ĝi dum nia vizito al minerala fonto en teatra skvaro. Kaj ĝuste tie la ĉeforganizanto ricevis nian donacon – pokalon kun E-emblemo de uljanovska klubo (fare de Sergeo Abramov) kaj termometron kun bildo de A.A.Plastov “Vilaĝa marto” por ke la soĉia kluba atmosfero restu por ĉiam varma.

Grandegan dankon al Galina Belenjuk, kiu ne nur rakontis dum seminario pri sia vizito al Argentino, sed ankaŭ invitis nin hejmen. Onidire tio estis granda plezuro. Mi tre bedaŭras, ke ne sukcesis viziti ŝin pro personaj motivoj, kaj esperas novan renkontiĝon kun Galina sekvontjare.

Esperantlingva seminaria parto enhavis diversurbajn raportojn pri kluba agado. Ankaŭ ni rakontis iomete pri niaj novaĵoj. Ĝuste antaŭ nia forveturo aperis nova scienca artikolaro, kie kelkaj artikoloj estis ligitaj kun Esperanto kaj E-kluba agado, kaj ĵurnala artikolo pri A.Saĥarov, unu el la unuaj esperantistoj de nia regiono. Pri nova junulara kluba grupo, kiu komencis sian laboron sub gvido de J.Karcev kaj S.Abramov, ni ankaŭ menciis.

Tamen la animo postulis la maron! Ĉi-foje ni ekpovis pasigi pli multe da tempo ĉe Nigra maro, ĉar la TILE-anoj vespere revenis al bazejo kaj post vespermanĝo faris ion laŭ la programo. Kaj ni sidis ĉe maro! Preskaŭ ĉiuvespere. Neforgeseble! Kaj ree aperis la propono fari malgrandan E-parton de la TILE-seminario surborde, se la vetero favoros nin.

Ni dankas la soĉianojn pro bona amika renkontiĝa etoso. Ili eltenis ĉiujn malfacilaĵojn, ligitajn kun ĉiutaga alveno kaj ĉiutaga forveturo de gastoj (hejmaj kaj laborejaj aferoj!) el diversaj urboj de nia lando: Dimitrovgrad, Gelenĝik, Jalta, Krasnodar, Kislovodsk, Maĥaĉkala, Nevinnomissk, Stavropolj, Taganrog, Tomsk,



Uljanovsk, Volgograd. Dankon en la nomo de ĉiuj 30 TILE-partoprenantoj el 13 urboj al la soĉianoj (brila teamo!) kaj ĝis revido! Ĝis nova renkontiĝo en la jaro 2015!

Margarita Karceva (Uljanovsk)
fotoj de Jevgenij Karcev (Uljanovsk) kaj Vladimir Derevjanko (Soĉi)

Ni proponas al la legantoj tekston de kanto, kiu aperis dum TILE-8.

Esperanto

Esperanto ne estas hobio.
Sonas ĝi kiel ĝoj' kaj ribel'.
Ĝi naskiĝis en urb' Varsovio,
Ĝia nuna patri' – tuta ter'.
Ĝi kunigas popolojn de l' tero
En la sankta batalo por pac'.
Estas ĝi la simbol' de l' espero,
Kaj kun kanto ĝi flugas al spac'.
Ĝi ne scias nek limojn, nek barojn,
Ne hezitu vi plu, kamarad'!
En estont' havos vi amikaron,
se aliĝos al nia movad'.
Kresku ni spite al ironio!
Estu indaj je homa estim'!
Esperanto ne estas hobio,
Sed – de vi kaj de mi la anim'!

Gennadij Mitrofanov (Taganrog)

LA 9-a MOSKVA LF: LA SEKVA PAŜO AL REKONO



La 7-an de decembro 2014 en Moskvo pasis la vica Lingva Festivalo – jam glorfama en la rusia ĉefurbo kaj tra la tuta Rusio. Ankaŭ ĉi-jare ĝin vizitis ĉirkaŭ mil interesiĝantoj. La kvanto de la festivalaj programer-proponoj apenaŭ enŝoviĝis en la limciferon 100. Estis prezentitaj 73 lingvoj, 18 lingvistikaj prelegoj, 10 praktikaĵoj plus du pupaj ekspozicioj, seninterrompaj ceremonioj de ĉina tegustumado, multlingva karaokeo kaj du spektakloj – unu prelegforma lingva koncerto

kaj la granda finala koncerto kun solenaĵoj.

Esperanton prezentis ĉeboksaranoj Aleksandr Blinov (kiu rakontis ankaŭ pri la ĉuvaŝa lingvo) kaj Tatjana Stepanova (ekskluzive estanta membro de MEA MASI) kaj moskvanoj Georgij Kokolija kaj Julija Samsonova. Nikolao Gudskov prelegis pri la 155-jariĝo de Ludoviko Zamenhof. En la Esperanta Gastejo kelkaj gastoj iom libere konversaciis kun kelkaj esperantistoj, foje turnante sin al la ekspozicio de E-libroj. En la antaŭkonferenceja vestiblo Svetlana Gonĉarova deĵoris apud la ekspozicio “Mia vorto”, sur kies fono okazis la fotosesio, kaj pri tio indas diri aparte.

Lanĉita de francaj esperantistoj somere 2012, la projekto “Mia vorto” estas daŭrigata de MASI-anoj jam dum kelkaj E-aranĝoj, kaj en la Lingva Festivalo iĝis netriviala popularigilo de Esperanto. Al ĉiu spektanto de la ekspozicio estis proponite fotiĝi kun laŭplaĉe elektebla vorto, kiun la homo devas trovi en la vortaro aŭ demandi de la deĵoranta esperantisto. La deĵoranto klarigadis, ke la afero estas dediĉita al la aŭtoro de Esperanto Ludoviko Zamenhof, kiu ĉi-jare havas 155-jaran jubileon, kaj proponis fotiĝi. La projekto elvokis viglan intereson kaj partoprenaktivadon ĉe la publiko.



Kun plena respondeco mi asertas, ke ĉiuj multnombraj ĉeestantoj de la festivalo scias pri Esperanto, danke memoras, ke ilian ŝatatan feston – la kulturan eventon, tra la tuta jaro atendatan, organizas la bonaj homoj – esperatstoj. Ili scias tion ĉar aŭdas pri Esperanto de la scenejo dum la Solena malfermo kaj la Solena fermo, vidas E-ekspoziciojn en la vestibloj kaj homojn kun Esperantaj insignoj, legas pri Esperanto en la festivala paĝaro kaj sociaj retejoj kaj ankaŭ en la programfolio, kiu estas la ĉefa helpilo kaj navigilo de la grandioza Festivalo por senescepte ĉiu organizanto kaj gastvizitanto.

Kiel ĉiam, la moskvan festivalon okazigis la Moskva Esperanto-Asocio MASI, sin apoganta al la scienca potenco de junaj moskvaj lingvistoj. La teamanoj zorgis pri organizaj aferoj kaj pri la naŭdeko da prelegantoj. Spe-



ciale menciindas kaj dankindas la laboro de Anastasija Golc (administranto), Aleksandr Lebedev (festivala paĝaro kaj zorganto pri la prezentantoj), Maksim Ĵitĉenko, Jekaterina Lozina kaj Irina Konopljanova (zorgantoj pri la prezentantoj), Ljudmila Vasiljeva (porinstruista teejo). Kernajn rolojn havis la iamaj MASI-anoj kaj finintoj de la E-kurso FaRo ĉe MEA MASI Svetlana Ŝiŝkina (organizanto de la Solena fermo kaj koncerto), Marija Aksjonova (la kunordiganto de volontuloj) kaj Aleksej Lebedev (la gvidanto de la ferma koncerto). Kelkaj MASI-anoj estis ankaŭ lingvoprezentantoj: Anastasija Golc (la finna kaj la estona), Aleksej Lebedev (la sveda), Julija Samsonova (la germana kaj Esperanto), Miĥail Ĥaminskij (la kataluna, la portugala, la belorusa), Tatjana Stepanova (Esperanto).

Multe helpis al la ĉi-jara evento la akceptantoj – sen tiuj la vaganta festivalo tute ne povus okazi. Ĉi-jare nin gastigis la ĉefa porinstruista altlernejo de Rusio – la Moskva Pedagogia Ŝtata Universitato (MPGU), pli ĝuste – ties Instituto pri filologio kaj fremdaj lingvoj. Indas emfazi, ke neniam antaŭe ni ĝuis tiom varman, samideanan kaj helpoplenan akcepton, neniam tiom da profesoroj de la akceptanta instanco kontribuis al la programo. Kaj neniam antaŭe la rektoro mem de la Universitato ĉeestis la tutan Solenan malfermon. En sia salutvoro la akademiano doktoro A.L.Semjonov alte aprezis la Festivalon kaj proponis la Universitaton por ĝi kiel konstantan bazon. Post la laciga kaj emociplena festivala tago, kiu daŭris de la 11-a horo kaj finiĝis post la 20-a per la



enmanigo de diplomoj dum la ĉarma diversnacia koncerto, la organizantoj kaj programkontribuantoj kuniĝis por la negranda festeno. Tie daŭris admirplenaj kaj dankaj paroladoj kaj denove sonis kantoj en la naciaj lingvoj, kaj kune kun ni festis la sukceson la vicdirektorino de la Instituto, katedrestro O.J.Drozdova, kiu invitis nin plu kunlabori pri lingvaj klerigaj projektoj.

Kial ne? Tre volonte ni revenos al MPGU. Eble, ne nur kun la Lingva Festivalo...

Irina Gonĉarova
kunordiganto de MEA MASI, direktoro de la MLF
http://www.lingvafestivalo.info/

MIA PARTOPRENO EN LA 9-a MLF

Mia vivo lastatempe riĉis je impresoj, kaj mi nur nun povas priskribi ilin, jam post ioma digestado. Eble mi komencu de tio, ke dum la Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburg mi akiris novajn E-amikojn. Tiuj estis tre simpatiaj gejunuloj, lernantoj de Irina Gonĉarova, kiuj venis el Moskvo kune kun ŝi por partopreni la lingvotrejnadon: Mildina (Natalja Laziĉ), Norden (Aleksandr Lebedev) kaj Karter (Aleksandr Basov). Kaj post unu monato, decembre, ili faras tute neatenditan surprizon al mi: invitas al la evento, kiun mi neniam partoprenis antaŭe, kvankam certe multon legis kaj aŭdis pri ĝi. Kia belega preteksto por denove renkontiĝi kun la amikoj!

Post la plena de aventuroj vojaĝo mi fine revidiĝis kun miaj moskvanoj, pasigis kun ili tri feliĉajn tagojn kaj unu el ili – en la Moskva Pedagogia Ŝtata Universitato, kie la 7-an de decembro E-asocio MASI organizis jam la 9-an Lingvan Festivalon. Kion mi povas diri? Ĉio elokvente atestis, ke MLF estas grandioza projekto, havanta grandegan sukceson! Ĝia skalo vere impresas: pli ol mil partoprenintoj, 71 prezentitaj lingvoj, 18 lingvaj prelegoj kaj multaj aliaj programeroj. Kaj certe mi vidis, ke tio estas evento neordinara, rimarkinda, dum kiu pluraj lingvoj, brilante per diversaj farboj, kunmetiĝis en riĉan majolikon kaj belegan vivan ornamaĵon. Tre allogaj lingvoprezentaĵoj vokis la scivolemon kaj intereson de lingvemuloj kaj ŝajne nemalofte bruligis ĉe ili fajran deziron studi iun novan por ili lingvon. Bedaurinde mi ne sukcesis ĉeesti multajn prezentadojn, nur kelkajn, sed eĉ tio, kion mi sukcesis partopreni – la runa malnovgermana (prezentaĵo de Igorj Mokin), la pola (prezentaĵo de Artjom Petrov) kaj lingvokoncerto de Marija Konoŝenko – tre impresis min. Precipe ĉarmis Marija, trovinte tute novan, originalan formon por rakonti dum 40 minutoj pri kelkaj lingvoj (la kalmuka, kpela, islanda kaj portugala) pere de kantoj en tiuj lingvoj.

Multe da tempo mi, kompreneble, pasigis en la Esperanto-gastejo, kie

en diversaj lingvoblokoj kvarfoje dum la tago estis prezentita nia kara Esperanto kaj ĉiufoje tion faris malsamaj personoj. Tri el tiuj kvar prezentaĵoj (de Aleksandr Blinov, de Garik Kokolija, de Julija Samsonova) mi tamen ĉeestis, ili estis diversaj, sed ĉiuj interesaj. Min ĝojigis, ke dum tiuj prezentadoj en la gastejo multis aktivaj kaj scivolemaj aŭskultintoj.

Ni ofte parolas pri la ponta rolo de Esperanto. Mi vidis, ke en tiu ĉi projekto ĝi reale plenumas tiun rolon, kunligante inter si multajn reprezentantojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj. Kaj Mirina estas mirinda reĝisoro de la tuto, kun la absolute ĝusta percepto, kiel fari, ke la evento estu alloga kaj utila por multaj. Vere, ĉi tie eblas malkovri multon novan kaj interesan por si! Mi ŝatus sincere danki Irina kaj la tutan teamon de la organizantoj pro tiu ĉi kolosa laboro! Kiom da talentaj gejunuloj! Kaj Irina mem estas persono kun la grandega krea energio, kiu altiras al si aliajn talentojn, tial ŝi kapablas organizi tiun rimarkindan festivalon kaj engaĝi en ĝin la E-amikojn, kolegojn kaj kune kun ili povas poste disvastigi la projekton diversflanken.



Apartaj momentoj de la festivala programo estas la solena malfermo kaj la fermo en la granda universitata halo. Apenaŭ transdoneblas per vortoj tiu entuziasmo, tiu ardo de emocioj, kiuj regas en la fino, dum la finala koncerto kaj postfestivala festeneto de la organizantoj, kiam homoj, plenplenaj de pozitivaj sentoj, diris multe da belaj tostoj kaj varmaj vortoj, kantis akompane de gitaro kaj eĉ senakompane. Vidante kiel la homoj ĝojas pri la komuna rezulto, ankaŭ mia koro ĝojis.

Mi tre dankas al miaj amikoj – MASIanoj, kiuj min invitis kaj donacis tiun eblecon dividi kun ili tiun ĉi feston. Mi deziras al Irina kaj ĉiuj ili ne halti ĉe la jam atingita, ĉiam elpensi ion novan, disvastigi la projekton, sekvajare brile okazigi la 10-an, jubilean lingvofestivalon, eĉ pli sukcesan kaj ricevi pli da plezuro de tiu kunlaboro!

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

LA UK EN NITRA KUN ŜTATESTRA PROTEKTO KAJ SPECIALA POŜTMARKO

La preparlaboroj por la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en la slovaka urbo Nitra komenciĝis kaj jam kondukis al du gravaj sukcesoj. La prezidanto de Slovakia Esperanta Federacio (SKEF), s-ro Stano Marček, kun fiero informas, ke la prezidento de Slovakio, s-ro Andrej Kiska, akceptis la inviton de SKEF fariĝi la Alta Protektanto de la 101-a UK. S-ro Kiska estis elektita kiel ŝtatestro ĉi-jare kaj plenumas la 5-jaran oficon ekde la 15-a de junio.

Aperos ankaŭ porokaza poŝtmarko. La ĝenerala direktoro de la Slovaka Poŝto, inĝ. Tomáš Drucker, konfirmis tion en letero al Stano Marček, en kiu li skribis pri la intenco eldoni du poŝtmarkojn en 2016, kiam Slovakio unuafoje funkcios kiel la prezida lando de Eŭropa Unio. Jam pli frue estis decidite, ke la unua marko estos dediĉita al "ŝtat-reprezentaj aferoj", sed la dua ankoraŭ ne havis specifan temon. "Tial ni bonvenigas vian iniciaton eldoni poŝtmarkon okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu same okazos ĉe ni la unuan fojon", skribis inĝ. Drucker, aldonante, ke "per komunaj fortoj ni sukcesos videbligi nian landon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la mondo".

Gazetaraj Komunikoj de UEA

MALFERMITA LETERO POR REU-ESTRARO

Jam delonge multaj esperantistoj ne kontentas pri financaj aferoj en REU. Neniam oni faris raportojn pri en- kaj elspezoj de la organizo.

Kutime, ĉiuj sociaj organizaĵoj fine de ĉiu jaro faras publikajn raportojn pri la elspezoj kaj la monstato kaj publikigas ĝin en la eldonaĵoj aŭ rete. Demandoj pri tio reaperis, ĉar la Estraro duobligis la membrokotizojn por aligitaj REU-membroj (klubanoj) kaj ne klarigis kialojn de tiu altigo.

Ja kiam la membrokotizo estis 70-100 rub., la kluboj ricevadis almenaŭ unu ekzempleron de la revuo REGo por 10-15 membroj de la klubo. Ankaŭ oni sendis por ĉiu klubano jaran membrokarton. Nun ni devas pagi po 200 rub., sed ni ne plu ricevas kaj la kartetojn, kaj la revuon por la klubo. Ni petas la Estraron klarigi kaŭzojn de tia ŝparemo.

Ankaŭ ĝenerale estas interese por ordinaraj REU-membroj scii por kiuj celoj kaj bezonoj oni uzas la membrokotizojn. Pro tiu nescio kaj duboj pri la elspezoj multaj esperantistoj, precipe komencantaj, ne volas pagi membrokotizojn kaj aliĝi al E-kluboj kaj fariĝas unuopuloj. Ni esperas je la respondo kaj bona volo de la Estraro.

Kun bondeziroj, atendantaj la afablan respondon,
anoj de Krasnodara E-klubo, la 6-an de decembro 2014

Bulteno de REU

№82 **DECEMBRO 2014**

finredaktita 12.12.2014

RET-2015

Rusiaj Esperanto-Tagoj
2015-07-14/21

Rusiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia aranĝo de esperantistoj de Rusio. La temo de ĉi-jara aranĝo estas "Multlingva Rusio". Krom RET okazos ankaŭ antaŭa programo en Sankt-Peterburg kaj Niĵnij Novgorod.

Programo: kurso de Esperanto, enkondukaj kursetoj de la ĉuvaŝa kaj rusa lingvoj, temaj prelegoj, ekskursoj al Kazanj, Ĉeboksari, Kozmodemjansk, koncertoj kaj multo alia.

Plej gravas en la programo:

laŭ decido de la Estraro de REU en kadroj de RET okazos raport-elekta Konferenco de REU. Ĉiu membro de la asocio pripensu proponojn por ĝia evoluigo kaj kandidatojn por la nova Estraro.

Aliĝdatoj: 1-a periodo – 15-a de januaro, 2-a periodo – 15-a de marto, 3-a periodo – 15-a de junio, 4-a periodo – surloke.

Aliĝkotizo: 1-a periodo – 500 rub.; 2-a periodo – 700 rub.; 3-a periodo – 1000 rub.; 4-a periodo – 1500 rub.

La kotizojn sendu aŭ transdonu (laŭ interkonsento pri persona renkontiĝo) al Aleksandr Blinov (al.blinov@gmail.com, tel. +7-902-3285051), en Moskvo – al Svetlana Smetanina (svsmetanina@yandex.ru, tel. +7-926-6083244), en Jekaterinburg – al Raja Kudrjavceva (komencanto@66.ru, tel. +7-343-2780895).

Loko de RET estas la bazejo Surskije Zori (http://surskie-zori.ru/)



60-a DATREVENO DE MONTEVIDEO

La Esperanto-movado festis la 60-an datrevenon de ĝia unua oficiala agnosko kadre de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj.

La 10-an de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de Unesko per oficiala rezolucio *notis* la kontribuojn de Esperanto *sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo*, kaj agnoskis, ke *tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko*. Jam du tagojn pli frue, la Organizo starigis konsultajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĉefa tutmonda organizo de la subtenantoj kaj uzantoj de la lingvo.

De tiu tempo, la Esperanto-movado ludas aktivan rolon inter la neregistaraj organizoj kunlaborantaj kun Unesko kaj UN. Aparte sur la kampoj de lingvaj rajtoj, la rajto de komunikado, edukado por paco kaj interkultura dialogo, UEA fariĝis konata kaj respektata kunaganto en tiuj medioj. Nelaste pro tiuj kontribuoj, Unesko en 1985 akceptis duan rezolucion, per kiu ĝi denove rekonis la potencialon kaj jamajn atingojn de la uzo de Esperanto kiel ilo de internacia kompreniĝo. La dua rezolucio aparte notis *la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝian partoprenon en tiu agado*.

Laŭ la decido de la Komitato de UEA en Bonaero, d-ro Fettes nun realigas kun siaj kolegoj en la Estraro tutjaran programon por festi la datrevenon kaj reliefigi la multajn ligojn inter la agadoj de la Esperanto-movado kaj la laboro de Unesko. Kulmino de la Jaro *Montevideo 60* estos la 100-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015 en Lillo, Francio.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

ESPERANTO KAJ UNESKO: 60 JAROJ DE KOMUNAJ STREBOJ

deklaro de la Prezidanto de UEA

Hodiaŭ, en la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, la movado por la internacia lingvo Esperanto samtempe festas la 60-jariĝon de sia kunlaboro kun Unesko, la branĉo de Unuiĝintaj Nacioj taskita pri edukado, scienco kaj kulturo.

Esperanto mem estas lanĉita antaŭ pli ol 127 jaroj, en 1887, kun la celo faciligi toleremon, kunlaboron kaj interkompreniĝon inter homoj el ĉiuj landoj. Per la disvastigo de lingvo, kiu estas komuna kaj libere uzebla posedaĵo de ĉiuj popoloj, la esperantistoj ekde tiu tempo laboras por la konstruado de unuiĝinta, paca, justa kaj prospera mondo.

Siavice, Unesko naskiĝis el la detruaj jaroj de la dua mondmilito, kiam fariĝis evidente, ke vera paco devas konstruiĝi *en la mensoj kaj la koroj de la homoj*. Tiu eduka misio ampleksas ne nur la bazan klerigadon, sed ankaŭ la profundigon de reciprokaj kulturaj konoj inter la diversaj landoj kaj popoloj, inkluzive de la roloj de scienco kaj teknologio en la konstruado de paca mondo.

Hodiaŭ tiuj streboj estas same aktualaj kaj urĝaj, kiel antaŭ 60 jaroj. La mondo intertempe fariĝis multe pli proksime interligita, sed la principoj de egaleco kaj justeco ne estas tiuj, kiuj regas la procezon de tutmondiĝo. Kreskas la minacoj al kultura kaj lingva diverseco, kiun Unesko same kiel la esperantistoj rigardas kiel trezoron de la homaro; kreskas malegaleco, inkluzive de lingva malegaleco, en multaj sferoj de la homa vivo; kaj daŭras persekutoj, konfliktoj kaj militoj surbaze de diferencoj kulturaj, religiaj kaj politikaj.

Kiel la ĉefa tutmonda organizo de la parolantoj de Esperanto, Universala Esperanto-Asocio rekonfirmas la profundan paralelon inter ĝiaj agadoj kaj la laboro de Unesko. Esperanto estas ne nur teknika rimedo de komunikado, sed kultura kaj eduka projekto, celanta daŭripovan kaj justan mondan socion. En tiu spirito ni alvokas por vasta subteno al la streboj de Unesko sur plej diversaj kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, kaj deklaras nian intencon plu energie labori por ilia diskonigo kaj realigo.

Mark Fettes,
Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

KOTIZREGULARO DE REU POR LA JARO 2015

(akceptita de la Estraro de REU 08.11.2014)

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto.

1. Individua kotizo – 250 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (laŭpete REU sendas la materialojn ankaŭ per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum la Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj, abono de REGo kaj en REU-aranĝoj.

2. Dumviva kotizo – 20-oblo de la individua kotizo. La dumviva membro ricevas ĉion saman kiel la individua membro dum la tuta vivo.

3. Mecenata kotizo – ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. La mecenato ricevas ĉion saman kiel la individua membro plus danka mencio en la Bulteno kaj en la asocia retejo <reu.ru>.

4. Kolektiva kotizo – 200 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). La aliĝinta kolektivo

ricevas membrokartojn (elektronikforme) por siaj aligitaj membroj, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn, voĉdonrajton por siaj aligitaj membroj dum la Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj, ĉe unu abono de REGo kaj en REU-aranĝoj.

5. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo – 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

6. Amiko de REU – senpage. Amikoj de REU ricevas rajton partopreni en REU-Konferenco sen voĉdonrajto, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Persono, sin anoncanta "amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian validan retadreson.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

La rublaj kotizoj pagendas al Bolŝakov Roman Andrejeviĉ. La pagmanierojn vidu sube aŭ en <http://reu.ru/paghoj/>. La eŭraj kotizoj sendendas al la UEA-konto "reua-p".

PAGMANIEROJ

1. Per Sberbank. Al la banka karto 6761 9600 0224 211426. Tion eblas fari senpere en bankoficejo, per Sberbank-Online, per bankaŭtomato kaj terminalo: <http://sberbank-sbrf.ru/karta-sberbanka/kak-perevesti-dengi-na-kartu-sberbanka-rossii.html>.

2. En Jandeks-Denjgi eblas pagi al la monujo 41001509170010, pagmanierojn vidu ĉe <http://money.yandex.ru/prepaid/>.

3. Poŝta ĝiro: Москва-117105, до востребования, Большакову Роману Андреевичу.

4. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas persone en Moskvo.

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas** retpoŝte aŭ telefone **informi nin pri via pago** (pere de la adreso <membreco@reu.ru> aŭ telefonaj numeroj de estraranoj). Vi devas informi pri la ĝirita sumo kaj nomo(j) de personoo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**

Eksciu, ke...

HUMPHREY TONKIN 75-JARA



La 2-an de decembro festis sian 75-an datrevenon prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA kaj TEJO. Tonkin, kiu esperantistiĝis en 1956, estis estrarano de TEJO de 1961 ĝis 1971, de 1969 ĝis 1971 kiel prezidanto. En tiu periodo li fondis la revuon *Kontakto* kaj estis ĝia unua redaktoro. En 1974 li fariĝis Prezidanto de UEA, kiun funkcion li plenumis ĝis 1980 kaj denove de 1986 ĝis 1989. De 2001 ĝis 2004 li estis vicprezidanto de UEA. Tonkin estas Honora Prezidanto de TEJO kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas ankaŭ longtempa direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ekde 2002 li estas prezidanto de la komisiono pri la Belartaj Konkursoj de UEA. Tonkin aktivas ankaŭ kiel aŭtoro, tradukisto kaj recenzisto, kaj li estas ŝatata oratoro kaj preleganto. Fakulo pri Ŝekspiro, li ofte prelegis pri ties verkaro, interalie en la Internacia Kongresa Universitato. Li ankaŭ esperantigis la dramojn *La vivo de Henriko Kvina* (2003) kaj *La vintra fabelo* (2006) de Ŝekspiro.

Okaze de la 70-a datreveno de Tonkin UEA eldonis la festlibron *La arto labori kune* (red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins) kun artikoloj de 100 aŭtoroj. La impona, 900-paĝa verko estas ankoraŭ aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. Filmo pri la transdono de la libro al Tonkin estas videbla en la Reta Kinejo de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

DU STUDPROGRAMOJ POR ESPERANTO-INSTRUADO ESTIS AKCEPTITAJ EN GRANDA RUSIA UNIVERSITATO

Ni ĝojas informi, ke la 14-an de novembro 2014 en Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) dum kunsido de Scienca Konsilio estis akceptitaj du studprogramoj por Esperanto-instruado. La 19-an de novembro laŭ la specialaj ordoj ili estis oficiale validigitaj. Ĉar RUDN estas ŝtata universitato de federacia nivelo kun rajto de memdifino de la studprogramoj, tiuj ĉi programoj iĝis aŭtomate tutrusiaj kaj atestiloj de la sukcesin-

toj estas agnoskataj tra la tuta Rusio kaj en dekoj da landoj, kiuj havas specialajn edukadajn kontraktojn kaj interkonstentojn kun Rusio.

La unua studprogramo nomiĝas “Baza kurso de Esperanto” kaj celas studentojn kaj tiujn, kiuj jam havas universitatan kleron. Fininte tiun kurson la lernantoj rajtas ricevi ŝtatan atestilon pri aldonaj profesiaj konoj. La dua studprogramo celas lernejanojn de la lastaj studjaroj kaj ajnajn aliajn personojn sen universitata diplomo. Ĝiaj finintoj ankaŭ ricevas specialan atestilon. La unuaj du grupoj de lernantoj jam komencis lerni Esperanton laŭ tiuj ĉi programoj en RUDN.

Tiujn kursojn antaŭis senpaga 5-leciona “fulmo-kurso”, kiun sume partoprenis pli ol 30 personoj en 3 grupoj. La finintoj ricevis honorajn diplomojn kun subskribo de la dekano de la filologia fakultato. La eldonejo “Impeto” donacis por la kurso libretojn kun Esperanto-gramatiko, kiuj estis senpage disdonitaj al ĉiuj partoprenantoj de la kurseto.

Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo)

TEJO PREMIERIS EN LA 41-a MALFERMA TAGO

La 41-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 29-an de novembro, havis pli ol 60 vizitantojn el 11 landoj. Oni aŭdis tri prelegantojn, el kiuj la konata Esperanto-aktivulo László Szilvási traktis du temojn. Sub la titolo *Ĉu asocioj bezonas membrojn?* li parolis pri la nuna stato kaj perspektivoj de neprofitcelaj kaj neregistaraj organizaĵoj en la interreta epoko. En sia dua prelego li analizis spertojn kaj problemojn de la amas-instruado de Esperanto en Hungario. Estrarano de UEA Barbara Pietrzak prezentis la kampanjon *Montevideo 60*, kiu daŭros ĝis la fino de 2015 por marki la 60-an datrevenon de la Esperanto-rezolucio de Unesko el 1954. Inĝeniero Toon Witkam, kiu siatempe iniciatis la pioniran projekton *Distribuita Lingvo-Tradukado* (DLT), prelegis pri la historio kaj evoluo de aŭtomata tradukado.



La estraranoj de TEJO (de maldekstre): Tina Tišljar, Tomasz Szymula, Veronika Poór, Łukasz Żebrowski, Michael Boris Mandirola kaj Nico Huurman

Inter la prelegoj oni spektis la novan filmon *Bona Espero – nia tero* de Roman Dobrzyński. En la programo estis ankaŭ

prezentado de Valère Doumont pri la Verdaj Skoltoj kiel formo de agado en Esperanto por adoleskuloj. Katalin Kováts raportis pri la ĝisnunaj atingoj kaj estontaj sesioj de la 5-jariĝantaj Esperanto-ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Krome ŝi rakontis pri la venontjare aperonta aŭtobiografio *Pri la destino* de Mila van der Horst-Kolińska, Honora Membro de UEA.

Laŭ la tradicio la unua programero estis prezentado de libroservaj novaĵoj fare de Ionel Oneț. Alia tradiciaĵo estis la senpaga loterio, kaj unuafoje en la historio de Malfermaj Tagoj estis la programero "La estraro de TEJO respondas". Tiu premiero estis ebla, ĉar la gvidantoj de TEJO kunsidis samsemajnfine en Roterdamo. Tre konvene temis pri la lasta programero, ĉar la ses estraranoj ricevis tiom da demandoj el la publiko, ke la diskuto daŭris eĉ post la planita unu horo.

La Libroservo vendis dum la tago por la sumo 1030,48 EUR. La plej popularaj libroj estis *Beletra Almanako 21*, *Homoj de Putin* de Kalle Kniivilä kaj *La angla sen instruisto* de Eugen Ionescu.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA INVITAS PRELEGI EN LA IKU-SESIO EN LILLO

Kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo (25 julio – 1 aŭgusto 2015) okazos la 68-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete aŭ paperpoŝte: *Prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo* (rete <amri@huji.ac.il>). La proponoj alvenu ĝis la 31-a de januaro 2015.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el la prelego kadre de IKU kaj el du kromaj prelegoj. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Aparte bonvenaj estos prelegoj kun rilato al la kongresa temo "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj", sed same bonvenos ankaŭ proponoj pri aliaj temoj. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – ĉio en ne pli ol unu paĝo.

Ĉiu preleganto devas mem zorgi pri sia aliĝo al la 100-a UK. Akceptita prelego estos rekompencita per honorario 260 EUR. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

la verda KoRo

kultura revuo

RIGARDO AL LA INTERNA RUSIO DEEKSTERE

Kalle Kniivilä: Homoj de Putin. Eld. FEL, Antverpeno, 2014. 165 paĝoj, broŝuritaj. ISBN 978 9077066 52 2

Kalle Kniivilä estas finndevena sveda ĵurnalisto, brile posedanta la rusan lingvon kaj multe verkinta pri kaj el Rusio dum la lastaj 25 jaroj. Aŭtune de 2013 li faris novan vojaĝon tra Rusio, vizitinte Moskvon kaj ankaŭ grandajn kaj malgrandajn rusiajn urbojn por trovi la respondon al la demando: kial plimulto da homoj, partoprenantaj balotojn (do, ĉirkaŭ triono de la tuta loĝantaro) ĉiam denove subtenas per siaj voĉoj sinjoron Putin, kiu de la unua vido (mi diru, ankaŭ de la dua kaj la tria!) ne aspektas ideala prezidanto kaj faras sufiĉe multe da misoj. Kiu do estas la reala homa bazo, danke al kiu tiu persono, kiu ofte neglektas homajn rajtojn kaj objektive reduktas civitanajn liberojn, jam 15 jarojn okupas en la lando la plej altajn postenojn?

K.Kniivilä partoprenis, kiel ĵurnalisto-observanto, balotojn de ĉefurbestro en Moskvo, li parolis kun pluraj homoj de diversaj profesioj: eksaj inĝenieroj, kiuj devas okupiĝi pri io alia, fabrikaj laboristoj, kiuj ĉu perdis, ĉu konservis siajn postenojn, busŝoforoj, flegistinoj – bunta vico de simplaj homoj, kiuj travivis malfacilan periodon de la vivo en la 1990-aj, spertis falojn kaj sukcesojn kaj nun plejparte atingis certan stabilecon de la vivo. Estas ne nur rusoj, sed ankaŭ reprezentantoj de aliaj etnoj – tataroj, ĉuvaŝoj. Ili ofte bone scias, ke ne ĉio glatas en la lando – la polico kruelas, koruptado grandas, ĉefaj televidkanaloj plenas je ŝtata propagando – sed tiujn homojn tiaj aferoj ne multe tuŝas, ĉar politikon ili strebas eviti, en televido interesiĝas pri filmoj kaj seriaroj, kaj volas konservi almenaŭ tion, kion ili ja havas. Por unu generacio unu tertremo sufiĉas. Tial ĝuste el la vicoj de la

provincanoj, finfine akirintaj la stabilecon, venas plejmulte da voĉoj por Putin, kies epoko signifas la stabilecon. Kio pri la nova generacio, kiu ne spertis la revoluciajn kaj ekonomiajn ŝtormojn de la 1990-aj, – ankoraŭ ne klaras, ĉar ĝi ne rapidas riveli siajn strebojn.

Kiel ĵurnalista verko, la libro de Kalle Kniivilä estus senriproĉa, se li ne provus fari kelkajn proprajn klarigojn al la priskribataj aferoj. Ofte tiuj klarigoj pri antaŭnelongaj historiaj eventoj estas tre trafaj (kiel, ekzemple, emfazo de tiu observo, ke la politiko de Putin estas daŭrigo de la politiko de Jelcin k.s.), sed samtempe li faras tri bazajn metodologiajn erarojn, kiuj iom senvalorigas la tuton. Tio estas, unue, blinda sekvo al la libro de Jegor Gajdar ("Falo de Imprerio…") en klarigo de kaŭzoj de la ruiniĝo de Sovetio. Gajdar, kiel fanatika novliberalulo (kvankam ekskomunisto!) ĉefe emfazis certajn internajn ekonomiajn kaŭzojn, kaj lia celo estis sin indulgi pri absolute malsukcesaj ekonomiaj reformoj, kiuj ĉion detruis, sed nenio kreiĝis – anstataŭ "ŝoka terapio" okazis ŝoko sen terapio (ke povis esti male, pruvas ekzemplo de pluraj landoj, de Ĉinio ĝis Slovenio).

Due, sekvante Gajdar-on, nia aŭtoro faras la duan principan eraron, pro kiu nenio en la nuna Rusio bone kompreneblas. Ja ne estas, kiel li asertas, iu "konspirteorio" pri tio, ke Sovetio ruiniĝis pro usona influo: ekzistis reala milito (bone, ke nur malvarma!), kiun Sovetio tute klare malgajnis. Kaj en la postsovetia Rusio en la komuna konscio gravegan rolon ludas la socia psikologio de malvenkinta popolo. Tion nepre necesis konsideri ankaŭ analizante la relative grandan subtenon al Putin.

Kaj, trie, parolante pri la opozociuloj (eĉ "radikalaj"), la aŭtoro preskaŭ ne montras, kiel iliaj "pozitivaj" programoj diferencas de tiu de Putin. Eble, pro tio, ke grandaj diferencoj tie ne ekzistas – kaj Proĥorov, kaj Navalnij, kaj plejparto de ceteraj estas laŭ siaj ekonomiaj ideoj eĉ pli sinsekvaj novliberaluloj ol Putin mem (kiu, pro desubaj protestoj, devis lasi certajn socialajn garantiojn kaj programojn, kion la aŭtoro ja honeste mencias) – se iu el ili ricevus potencon, la ekonomia situacio de la malfortaj tavoloj de la popolo povus nur malboniĝi. Mi kaj multaj miaj amikoj, kiuj dum jaroj kontraŭstaras al Putin, ĉe neniu vetero voĉdonos por Navalnij aŭ Proĥorov. Do la popolo (tiu parto, kiu dume balotas) ofte preferas kutiman malbonon al la minacanta de Navalnij kaj ceteraj malpliboniĝo!

Ĉiuokaze, la libro estas ege interesa kaj unuavice rekomendindas por legado al esperantistoj el Rusio – por ili plej grave estas, kiel ilia kutima vivo aspektas deekstere. Almenaŭ la frazo "Moskvo estas urbo de kontrastoj", per kiu Kalle Kniivilä komencas la ĉapitron pri Moskvo, valoras multon… (Noto: temas pri modifita famega frazo el populara sovetia komedio, kiu parodiis komencon de ĵurnalismaj kliŝaj raportoj pri kiu ajn ekstersovetia

urbo.) Ankaŭ alilandaj homoj, kiuj interesiĝas pri la lando, ekscios multajn vivajn detalojn, kiujn oni kutime neglektas, sed kiuj konsistigas la realecan bildon de normala ekzistado de simplaj homoj.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

(recenzo el "Monato", januaro 2015)

NOVAJ DISKOJ DE VINILKOSMO

MARTIN & LA TALPOJ: "Superbazaro"



La unua kodisko, "Povus esti simple" de la antaŭa grupo de Martin Wiese, aĝas jam preskaŭ dudek jarojn kaj klasigas Martin inter la pionirojn de rokkantado en Esperanto! Martin prezentis sian novan grupon, "La Talpoj", en 2007, kun la albumo "Pli ol nenio"; kaj sep jarojn poste ili prezentas al ni la diskon "Superbazaro", la frukton de tiuj jaroj da verkado, komponado, kaj registrado. Per mikrofonhava gitaro kaj diversaj aliaj instrumentoj, Martin estas la centra kolono de la grupo, kune kun Johan Lagerdahl per baso, kaj Matias Levin per drumo; la grupo portas la potencajn melodiojn kaj la altnivelan poezion de Martin, ĝis la pintoj kiujn li ŝatas esplori. Kiel en la unua albumo de "La Talpoj", la kantoj en "Superbazaro" kovras vastan gamon de tonoj, subtile ligante akustikajn sonojn, tenerajn kaj folkecajn, kun la energiaj antipodoj de alternativa roko. La plej multaj kantoj en la albumo estas tutnovaj; tamen kelkaj, kiel "Sub la ponto" kaj "Nova jaro" jam estis prezentitaj en reta demoalbumo, sed aperas en la albumo komplete reverkitaj kaj netigitaj. Notinda estas la kunlaboro de kelkaj famaj artistoj kiel la nemalhavebla Ĵomart Amzejev, Eric Languillat de "Inicialoj DC", Anders Grop, la basisto de "Persone" el la unua epoko, kaj multaj aliaj malkovrindaĵoj. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi: <http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkkd125&lng=e>.

ĴAK LE PUIL: "Sen elizi'"

Ne malpli ol dek jarojn post "Mi estas" Ĵak revenas, daŭre tiom kontestema, ŝercema kaj sentimentala. Ĵak jam estis registrinta kvar kasedojn: "Danĝera ul'" en 1977, "Revenas mi" en 1980, "De Pont-Aven al Varsovi'" en 1985 kaj "Ne donu tro" en 1993. Alivorte, la dua KD respegulas ne malpli ol 37 jarojn de la kariero kaj muzika spertado de la daŭre sen-

ŝanĝa artisto! La naŭ originaj titoloj de la albumo estis komponitaj de Ĵak, kaj la tekstoj verkitaj de Christian Sedant, Eŭgeno Miĥalski, Jopetro Danvy, Stefan Maŭl, Marjorie Boulton, Mazda, Georges Lagrange kaj Ĵak mem. Vi trovos ankaŭ tri "tradiciajn" titolojn: "Ho belulin'" (Bela ciao) en traduko de Renato Corsetti, "La kavaliroj de la Ronda Tablo" tradukita de Michel Duc Goninaz, kaj "La edzino de la kolportisto" transmetita en la senlandliman lingvon de Jacques Manceau. Kaj por fini la feston, du kantojn tradukitajn el la franca, "Klifo kaj maro" (La falaise et la mer) de Ghislain Schreurs tradukitan de Georges Lagrange kaj "Revenas mi" (Je reviens chez nous) de Jean-Pierre Ferland en traduko de Jean-Pierre Danvy. Notinda estas la partopreno de JoMo, kiu jam plene kunlaboris en "Mi estas", ĉi-foje per gitaro kaj balalajko, kaj ankaŭ de Pjer Buvje per kontrabaso, Jean-Claude Patalano per aldo- kaj soprano-saksofonoj, klarneto kaj koncert-fluto, kaj Yo (de grupo "Brassen's Not Dead") per drumoj. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi: <http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkkd124&lng=e>.



"NI LABORU KAJ ESPERU"

(L.L.Zamenhof. Proverbaro de Esperanto)

Proverboj konsistigas siaspecan enciklopedion de la popola sagaco, kie troveblas respondoj al ĉiuj gravaj demandoj pri la vivo rilate ĝiajn manierojn kaj valorojn. Same kiel Esperanto mem, proverboj en Esperanto kunigas diverspopolajn homojn per sia komprenebleco. Se finno tralegos en verko de araba aŭtoro, ke ŝipo de du kapitanoj dronas, kaj se arabo tralegos en verko de finna aŭtoro, ke ju pli multas kuiristoj, des pli akvecas fiŝsupo, ambaŭ komprenos, pri kio temas. En sia "Enkonduko al Proverbaro esperanta" G.Waringhien skribas, ke "... kiam la Proverbaro akiris sendependan ekziston, oni volonte vidus migri tra ĝiaj linioj, krom niaj tradiciaj bovoj, hundoj aŭ musoj, ankaŭ la simpatian hienon aŭ la teruran tigron de la hindaj proverboj; la teo kaj la sakeo de niaj flavaj samideanoj estus bonvenaj apud nia vino kaj biero." Kaj, eble, interesa estos jena provo prezenti aldone al "La Proverbaro" de Zamenhof novajn diverspopolajn proverbojn koncerne la laboron laŭ ĝiaj ĉefaj principoj, akceptataj ĉie same.

Sen streĉoj nenio fariĝas.

Per sidado urboj ne venkeblas (rusa). Kiu volas grandan kuleron, tiu prenu ankaŭ grandan pioĉon (bulgara). Kiu bezonas akvon, tiu fosu puton (japana). Kiu volas manĝi nuksojn, tiu devas rompi ilin (angla). Por flugi necesas svingi la flugilojn (korea). Sen rompo de ovoj ovaĵo ne friteblas (franca). Por akiri tason da rizo necesas eligi tason da ŝvito (vjetnama).

Pigreco.

Pigrulo meze de rivero petas trinki (rusa). Pigrulo havas sep festojn en semajno (armena). Por pigra ĉevalo la ĉaro ĉiam estas peza (korea). Kato ŝatas fiŝon, sed ne emas enakviĝi (ukraina). Pigran katon nur musoj ŝatas (mordva). Pigrulo ankaŭ en sia hejmo estas gasto (kazaĥa). Kiu sidas en espero pri vespermanĝo de la najbaro, tiu restas malsata (irana).

Ne per lango, sed per faro.

Vento de vortoj ne movas muelilon (rusa). El ovoj, kovitaj per lango, ovaĵo ne friteblas (inguŝa). Formikoj ne aŭdeblas, sed ilia laboro estas vidata (adigea). Per krio kverko ne forhakeblas (ukraina). Kampo ne prisemeblas per vortoj (laka). Paroloj pri mielo elokventas, sed lipoj ĝian dolĉon ja ne sentas (dagestana).

Ne faru iel-tiel.

Ielo-tielo ne venigas al celo (rusa). Levi trancîlon kontraŭ kulo (mongola). Ne indas pumpi akvon el malplena puto (angla). Ne persekutu blaton per ŝpato (belorusa). Al malbona kudristino eĉ kudrilo kun fadeno malhelpas (jakuta). Bovido sur du herbejoj paŝtata plej ofte restas malsata (dagestana). Faru malgrandan aferon, kiel la grandan (baŝkira).

Labori kune – ĉu ĉiam?

Fingro malfortas, pugno fortas (rusa). Unu abelo ne faras multe da mielo (ĉuvaŝa). Multe da kuloj mortigas leonon (hungara). Multe da haringoj forpelas grandan fiŝon (sveda). Eĉ paperfolio malpli pezas, se levi ĝin duope (korea). Inter multaj kuiristoj estas neniu por sali kaĉon (azerbajĝana). En hejmo de du mastrinoj koto ĝisgenuas (irana). Se ĉe unu fornelo tri kuiristoj tumultas, la manĝaĵo karbiĝas (bengala).

Ĉiujn aferojn – ĝustatempe.

Mankas tempo por danci, se necesas falĉi (rusa). Nefinita afero egalas tripiedan ĉevalon (afgana). Ne svingu knuton antaŭ surĉevaliĝo (ĥakasa). Ne laŭdu veteron matene kaj liton vespere (karela). Dum lepor' enarbustas, ne surfajrigu kaldronon (avara). Ne kriu pri fritita fiŝo, dum la viva ne estas kaptita (itala).

Zorgu pri la tempo.

Rapidu – ankaŭ la hodiaŭa tago havos vesperon (litova). Rapidu malrapide (angla). En hastan laboron diablo enmiksiĝas (tatara). Ne atingis maron rojo – ĝi tro hastis dum la vojo (dagestana). Laŭ la strato Jen-jeno oni trafas en la domon Neniamo (angla). Sciu valoron de minutoj, kalkulon de sekundoj (rusa). Preterlasita tempo ne kapteblas eĉ per la plej longa lazo (mongola). La tempo flugas ankaŭ ĉe fermita pordo (litova). Ne forgesu, ke eĉ centjara vivo estas nur tridek ses mil tagoj (korea).

Por kio do kolekti kaj sistemigi diverspopolajn proverbojn, pli kaj pli kompletigante "La Proverbaron" de Zamenhof? Ĉar "... nenio povas pli efike servi al la fortika unueco de nia parola kaj skriba lingvo, kiel la posedo, la aktiva posedo de komuna trezoro el figuroj, bildoplenaj kaj tute pretaj parolturnoj, kies internacian kompreneblecon oni ne bezonas kontroli." (G.Waringhien. Enkonduko al Proverbaro esperanta).

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

NASKIĜTAGE DE L.L.ZAMENHOF

Por homo l' karmemora
Denove sonas kanto
En lingvo la plej kora –
En Esperanto.

La viv' en verdaj vestoj
Nun krize ne altiras,
Kaj tamen kriztempestoj
Alvenas kaj foriras.

Junigas klubaj vibroj
Per l' Esperanto-vorto,
Aperas bonaj libroj,
Impresas UK-a forto.

Pri l' noblaj lingvaj veroj
En ĉiam nova sento
Bonflugu do esperoj
Plu per facila vento!

Kaj, kiel stelo graca,
Plu brilu diamanto

De lingvo la plej paca –
Esperanto!

Krizoj la mondon skuas,
Iĝas klimat' pli varma,
Murdoj kaj akcidentoj
Ĉiam pli ofensivas,
Naciistaroj bruas,
Rampas aŭgur' alarma,
Febras tordataj sentoj –
Sed Esperanto vivas!

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

KATO SUR POMARBO EN VINTRO

Nigras kato, ruĝas pomoj,
Inter ili bluas alt'.
Sed ne pentras l' belon homoj,
Ne aperas farba art'.

L' bela kato vane pozas,
Pozas vane l' poma arb'.
Nia vivo kuriozas:
L' vivo belas, mutas farb'.

Nikolao Neĉajev (Irkutsk)



kartvela danco dum la Moskva Lingva Festivalo

Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburg



Lingva Festivalo en Moskvo



☺ AMUZAJ MISSKRIBOJ ☺ ☺ KAJ ERAROJ ☺

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo:

Centa Oficejo (anst. Centra)

homorario (anst. honorario)

Moskva regino (anst. regiono)

unuperona ĉambro (anst. unupersona)



la projekto "Mia vorto" dum la Moskva Lingva Festivalo



FELIĈAN

NOVAN

JARON

AL ĈIUJ!